


8
E
r
t
i
k
a
-
E



ENHAVE

Enkonduke	2
Okazonte	2
Informe	3-4
Raporte - FEL	5-9, 12-14
Opinie	10-11
Raporte - Aliaj	15-16
Okazinte	16
Reage	17-18
Aliĝilo U.K. '96	19-20

Flandra Esperanto-Ligo

Estraro:

Prezidanto:	<i>Ivo Durwael</i>
Vicprezidanto:	<i>Wim De Smet</i>
Sekretario:	<i>Johan Van Eenoo</i>
Vicsekretario:	<i>Marc Cuffez</i>
Kasisto:	<i>Flory Witdoeck</i>
Anoj:	<i>Henny De Ketelaere</i> <i>Jef Geraerts</i> <i>Walter Vandekieboom</i>

La oficejo de FEL troviĝas en Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Ĝi estas malferma por la publiko ĉiun labortagon inter la 9a kaj 12a30 kaj inter la 13a30 kaj 17a30. Vizitantoj bonvolu tamen anticipie interkonsenti pri rendevuo.

Telefono (ofichoroj): (03) 234.34.00
Telekopiilo (tagnokte): (03) 233.54.33

Kontribuantoj: Cor van Ekelenburg, Paul Peeraerts, Ivo Durwael, Jacques Schram, Roland Rotsaert, Johan Van Eenoo, Marc Cuffez.

La ĝenerala respondeco de la revuo restas ĉe la redaktoro, la verkistoj mem respondecas pri siaj propraj artikoloj aŭ raportoj, kaj la enhavo de ili ne devas kongrui kun la opinio de la redaktoro.

Vertikale, dumonata periodaĵo por la aktivuloj de FEL. Abonoj ĉe FEL.

Numero 11, apero: oktobro 1995

Korespondadreso: Vertikale

Cor van Ekelenburg
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 (ofichore)

ENKONDUKE

Kara aktivulo-leganto,

Jen, nova *Vertikale* en viaj manoj. Eble iom malfrua, iom alia, sed pli diversa. Mi dediĉis iom pli da tempo al la aspekto, mi esperas, ke ĝi plaĉas.

Nova nun estas la divido en rubrikoj; antaŭe tio apenaŭ havis senco, ĉar plej-grandparte *Vertikale* konsistis el protokoloj, sed tio - feliĉe - ŝanĝiĝis, kvankam la protokoloj restas gravaj.

Certe ankaŭ grava estas la novaj reguloj pri la subvenciado, FEL-prezidanto Ivo Durwael donas pli da klarigoj, troveblaj en la rubriko *Informe*.

Por pli da informo; pri la funkciado de la centro, legu la malfermitan leteron en la rubriko *Reage*.

La rubrikon *Opinie* mi tre ŝatas. Jen homo, kiu uzas la eblecon por sciigi sian opinion, kaj prave! Ĉu venos reagoj?

Cetere, ĉi tiuj du lastaj rubrikoj estas por vi, leganto, taŭgaj manieroj por doni viajn opiniojn kaj reagojn pri kio okazas kaj tuŝas vin en Esperantujo. Do, kial ne uzi ilin ...?

Kompreneble estas ankaŭ la kutimaj FEL-protokoloj, por ke vi sciu per kio oni okupiĝas en la aktiva vivo.

Restas al mi ankoraŭ indiki la rubrikojn *Okazinte* kaj *Okazonte*, kaj ankaŭ tie vi povas kontribui. Se io okazis, raportu; se io okazos, anoncu! Tio povas esti interesa rilate al la novaj subvenciaj reguloj.

Fine mi ankaŭ menciui la aliĝilon por la praga Universala Kongreso sur la lastaj paĝoj de ĉi tiu numero.

Ĝis en la venonta numero.

Cor van Ekelenburg.

OKAZONTE

* Faulhaber-semajnfino: 27-29/10/1995.

* Trilanda Renkontiĝo: 12/05/1996.

* Antwerpen '96: kultura kaj turisma semajnfino de 24 ĝis 27/05/1996.

INFORME

Novaj dekretoj pri subvenciado

Kara aktivulo,

En la 25a de aŭgusto 1995 mi dissendis cirkuleron al la prezidanto, sekretario kaj kasisto de ĉiu loka FEL-grupo pri la novaj reguloj sekve de nia peto por esti rekonita kiel servo. Mi citas el tiu letero:

„De jaren '95, '96 en '97 zijn overgangsjaren om ons in regel te stellen met de nieuwe decreten. Toch hebben we er financieel belang bij om zo vlug mogelijk in regel te zijn. Daarom VRAAG IK MET AANDRANG, DAT ELKE CLUB VANAF 1 SEPTEMBER E.K. AL HET NODIGE DOET VOLGENS DE NIEUWE REGELS.”

Intertempe mi partoprenis aktivecojn en Antwerpen, Kalmthout, Kortrijk kaj Turnhout. En ĉiu grupo mi devis insisti pri la uzo de ĉeestolisto. De neni grupo mi ĝis nun ricevis la specialan formularon por antaŭanonci proprajn aktivecojn.

Mi devas ripeti mian alvokon. En oktobro ni devus antaŭanonci niajn aktivecojn kaj krei ĉe niaj membroj la kutimon por subskribi la ĉeestoliston. Nun ni povas senriske ricevi komentojn de la administracio pri eblaj eraroj. Ek de decembro ni ne plu rajtas erari, se ni volas esperi je rekono de la ministro en oktobro 1997. Se nia dosiero pri 1996 ne estas kontentiga, ni povus denove provi por akiri rekonon en 1998.

Tio signifas unu jaron da prokrasto por la esperata plialtiĝo de niaj subvencioj. Se en 1997 nia dosiero ne ricevas benon de la ministeriaj inspektoroj, tio signifas, ke ni perdos ĉiujn subvencieblecojn dum 3 jaroj. Tio signifus certe la finon de la centro en Antwerpen, la finon de belaspektaj revuoj, de eldono de informmaterialo, de pritraktado de informpetoj, de libroservo ... Mi esperas, ke vi konscias pri la graveco de mia peto por enordigi viajn paperojn!

Vi atentu, ke ĉiuj aktivecoj havu la nomon „Vlaamse Esperantobond” kiel organizanto. La minimumo de ĉeestantoj estu 10 (kaj mezume 12 por kursoj). Do nepre zorgu por sufiĉe da subskriboj.

Ni aŭdis, ke inspektoroj de la Ministerio efektive faras kontrolon pri la nombro da ĉeestantoj. Ni ne timu, ke foje iu inspektoro ne trovas 10 ĉeestantojn. Sed ni evitu, ke tio okazu ofte. Se vi atendas, ke vian programon ĉeestos nur eta grupo, vi krajone notu ĉe la nombro da atendataj partoprenantoj vian realan atendon. Ni devus antaŭanonci nur la duonon de niaj aktivecoj. Tiel ni povos en la centro elekti por antaŭanonci tiujn aktivecojn, kiuj estas „senriskaj” rilate nombron da ĉeestantoj.

En via pakaĵo vi ankaŭ trovis anoncpaperojn por „een informatie-campanje, een happening of een tentoonstelling”. Fakte, mi ne estus devinta sendi ilin, ĉar la ministerio konsideras nur tiajn aktivecojn sur nacia skalo, kiujn ni antaŭanonas en nia aktivecplano dum la jarkunsido de FEL kaj kies graveco teorie postulas kvaronjaran labortempon de oficisto. Do en la praktiko la aktivecoj de lokaj grupoj ĉiam estas aŭ (propra) „educatieve activiteit” aŭ „ondersteuning, advisering, begeleiding” (ĉe alia asocio aŭ ĉe individuoj). Kiel servo ni pli kaj pli specialiĝu en la akompanado kaj subtenado de aliaj kulturaj asocioj. Tio signifas, ke ekde nun ni strebu al la organizo de informaj prelegoj, kursoj ktp en la kadro de alia asocio anstataŭ organizi ĉion mem. FEL volas helpi vin sur tiu kampo per disponigo de afiŝoj, faldfolioj ktp. Ni devas ĉefe okupiĝi pri REKONITAJ soci-kulturaj asocioj por PLENKRESKULOJ, sed ne nur pri ili. Eĉ se gvidanto(j) de alia(j) asocio(j) konsultas vin kaj petas informojn dum 1 horo, vi demandu lian/ilian subskribon sur la formularo „ondersteuning, advisering, begeleiding” kaj via aktiveco validas por 2 horoj. La samo validas por individuoj. Sed kiam vi organizas ion pli longdaŭran (informan prelegon, kurson, informan budon ...) vi antaŭanoncu tion. Ni devas centralizi ĉion en nia Esperanto-centro kaj poste plusendi al Bruselo du semajnojn antaŭ la aktiveco.

Tio nur sukcesos, se vi pli frue sendas viajn anoncojn.

Do vi sendu ĉiujn viajn anoncojn pri propraj aktivecoj kaj pri aktivecoj en aliaj asocioj samtempe kun viaj anoncoj por Horizontaal ĝis la 5a de ĉiu para monato. Samtempe vi povas sendi viajn ĉeestolistojn de la pasintaj aktivecoj, samtempe kun invitletoj, anoncoj en la gazetaro, afiŝoj kaj eventuale aliaj pruviloj.

Ŝajnas al mi, ke la nuna dekreto pri servoj povos doni novan impulson al nia agado. En la plimulto de niaj lokaj kernoj kunvenas nur manpleno da membroj, kiuj kutime estas motivitaj kaj volas dediĉi tempon kaj energion por Esperanto. Tia grupeto ofte ne estas sufiĉe forta por daŭre organizi propran vivon, sed ideala kiel malgranda laborgrupo, kiu disponigas sin al aliaj asocioj. Per tia agado ni sendube ankaŭ enpenetros en novajn mediojn, en asociojn, kiuj havas pli da rimedoj por diskonigi siajn aktivecojn kaj disponigas siajn eblecojn al Esperanto.

Ni sendube ankoraŭ plurfoje retraktos tiun ĉi temon en niaj administrataraj kaj ĝeneralaj kunsidoj. Se intertempe vi havas demandojn aŭ sugestojn, vi ne hezitu por kontakti min aŭ alian estraranon.

Via,

Ivo Durwael,
Prezidanto.

RAPORTE - FEL

Protokoloj de FEL-Kunvenoj

Administrantaro, 95.02.25

Kunveno je 95-02-25 en Gent (nova sidejo de La Progreso), ekde la 10a.

Ĉeestas: Wim De Smet*, Ivo Durwael, Roland Rotsaert*, Piet Glorieux, Jules Verstraeten, Henny De Ketelaere, Ingrid Lievens, Katja Lödör, Ghislain Jacobs*, Lucien De Sutter*, Jef Geraerts.

(*ankaŭ ĉeestis posttagmeze)

1. Wim De Smet gratulas la Progreson, kaj speciale la familion Lödör, pro la nova klubejo kaj kiel donacon transdonas la libron „La Dia Komedio” de Dante.

2. Roger Goris transdonis sian voĉdonrajton al Ghislain Jacobs, Cor van Ekelenburg al Jules Verstraeten kaj Edward Symoens al Wim De Smet. Wim De Smet konstatas, ke ĉeestas/estas reprezentata sufiĉa nombro de administrantoj.

3. Tagordopunktoj

Ivo Durwael proponis forstreki punktojn 14, 16, 17 kaj 18 (pri regularoj) el la tagordo. Propono akceptita (6 jes, 4 ne, 2 sindetenoj).

4. Raporto pri la administrantarkunsido de la 6a de novembro 1994

Aprobata post kelkaj korektoj: Ivo Durwael ne ĉeestis, Henny De Ketelaere kaj Cor van Ekelenburg jes ĉeestis; fine: la prezidanto *fermas ... je 15.10a h.*

5. Raporto pri tiu de la 10a de decembro 1994 (Bruselo)

Aprobata.

6. Raporto pri tiu de la 6a de januaro 1995

Piet Glorieux rimarkas, ke li ne ricevis la raporton. Wim De Smet laŭtlegas ĝin.

Korekto: „... sekve oni aldonu al punkto 5ĉ ...” iĝu „... 6ĉ ...”.

Aprobata.

7. Raporto pri tiu de la 27a de januaro 1995

Amendo de Wim De Smet: Je la 6a de novembro ne mankis kvorumo, sed ne estis aprobo pro tempomanko. Aprobata.

8. Konfirmo de la decido de la 27a de januaro 1995

Ĉiuj ĉeestantoj konfirmas la decidon.

9. Fondaĵo Vanbliervliet

Wim De Smet skizas la situacion. Piet Glorieux faris detalan raporton, sed, kontraŭe al lia intenco, ĝi estis sendita nur al la estraranoj, ne al ĉiuj administrantoj.

Resume: funkciado de la biblioteko preskaŭ ne plu eblas. Bezonataj estas pluraj volontuloj, kun unualoke sperta persono, kiu kapablas kunordigi la laboron kaj prizorgi korespondadon ktp.

Surbaze de la raporto Wim De Smet proponas baldaŭ kunvenigi reprezentantojn de la Konkordo, FEL, la urba biblioteko kaj specialisto(j)n. Roland Rotsaert klarigas la nun pridiskutatan dekretan pri „Volksontwikkeling”, laŭ kiu la Fondaĵo Vandervliet povus funkcii kiel informcentro de FEL (kvankam tio ne tuj havigos aldonajn subvenciojn).

Lucien De Sutter anoncas, ke se volontulo estus (edzino de) fervojisto, li povas havigi senpagajn vojaĝbiletojn. Roland Rotsaert atentigas pri neceso de kunlaboro kun similaj bibliotekoj tutmonde.

Katja Lödör anoncas, ke Monique Caestecker sekvas bibliotekan kurson kaj eble povas konsili.

Kromaj rimarkoj: funkciado de interbiblioteka prunedonado estas esplorenda; ĉu dungito de FEL povus labori en Kortrijk unu tagon semajne?

10. Agado „Wie kent wie”

Wim De Smet bedaŭras, ke venis malmultaj respondoj (nur Loveno serioze reagis) kaj denove faras alvokon.

11. Kandidatoj „administrantoj” kaj „komitatano UEA”

Wim De Smet atentigas pri la nova, strikta regularo; ĝis nun apenaŭ venis skribaj kandidatoj de la grupoj. Grupo, kiu neniu indikas, ne havos reprezentanton. Kandidatoj por kooptiĝo anoncu sin.

Antaŭ la fino de marto FEL sciigu, kiu estos (nome de BEF) la komitatano de UEA (ĝis nun Alex Humet).

12. Kandidatoj por la estraro

En la estraro estas minimume 5 personoj, elektitaj de inter la administrantaro. Kandidato konsciu, ke estas peza, serioza tasko. Ingrid Lievens ne kandidatiĝas. Ivo Durwael jes kandidatiĝas, sed retiriĝos se Wim De Smet iĝas prezidanto. Roland Rotsaert ne kandidatiĝas kaj, post peto de Ghislain Jacobs, klarigas kial: anonima letero, kiu kulpigis i.a. lin; neeblo de utila laboro en la estraro dum la pasinta jaro.

Ghislain Jacobs demandas sin, kiel Ivo Durwael elektiĝis estrarano. Wim De Smet klarigas, ke li anstataŭas Jacques Schram, kiu retiriĝis. Ŝanĝo estis konfirmita dum administrantarkunsido en Brugge. Piet Glorieux petas, ke la kandidat-prezidantoj antaŭe klarigu siajn planojn.

Wim De Smet mencias la cirkonstancojn en kiuj li iĝis prezidanto kaj detale skizas siajn ideojn. Li ripetos tion okaze de la jarkunsido.

Ivo Durwael klarigas sian malinterkonsenton kun Wim De Smet. Li bedaŭras, ke la administrantoj dum la pasinta jaro malofte havis ŝancon por esprimi siajn zorgojn. Por li plej gravas la problemoj de la grupoj, ne la paperaj strukturoj. Li ne volas malhelpi strukturojn, sed ili estu simplaj.

Roland Rotsaert opinias, ke, se la estraro daŭrigas kiel pasintjare, post 2 jaroj ne plu ekzistos Esperanto-centro en Flandrio.

13. Proponoj Ghislain Jacobs kaj Roger Goris (Esperanto 2000, Leuven)

a. *Simbolo*: la kunveno decidas prokrasti la diskuton (por: 3, kontraŭ: 3, sindetenoj: 8).

b. *Statutoj de FEL*: ekzemple oficaŭro de la prezidanto, statuta kongreso.

Wim De Smet respondas, ke adapto de la statuto necesigas diversajn formalajn.

Je la 12.30a oni interrompas la kunvenon por tagmanĝo. Por la posttagmezo Jef Geraerts transdonas sian voĉdonrajton al Ghislain Jacobs; Jules Verstraeten, Henny De Ketelaere kaj Ingrid Lievens al Roland Rostaert.

c. *Strukturoj de FEL*: la lokaj grupoj zorgu, ke la administrantoj aktivu dum kunsidoj kaj transdonu la ideojn de la bazo. Reciproke, la ekzemple venu de supre.

ĉ. *Lobiado*: antaŭe estis pluraj eminentuloj, kiuj esprimis sin favore al Esperanto. Wim De Smet memorigas la malsukceson de la agado „Wie kent Wie”.

d. *Esperanto en instruado*: ne venas multaj personoj al la vesperaj kursoj, multaj rezignas pro tempomanko kaj ne restas en la kluba vivo. Jam nun oni antaŭvidu alian situacion: enkondukon de Esperanto en la lernejojn. Necesas interesiĝi (tra ILEI) profesiajn instruantojn kaj parlamentanojn. Wim De Smet bedaŭras, ke la komisiono pri instruado apenaŭ funkcias.

e. *Organoj de FEL*: Ĉu *Vertikale* ne estas perdo de tempo kaj papero? Roland Rotsaert respondas, ke *Vertikale* estas la nura ilo por informi aktivulojn, kiuj ne estas administrantojn; en la lastaj numeroj ja estis nur raportoj, sed estis escepta situacio, ĉar dum longa tempo mankis redaktoro. Ankaŭ Wim De Smet ne estas kontenta pri la revuoj (*Vertikale* kaj *Horizontaal*), sed ĉu troveblas alia redaktoro? Li anoncas la eblan kunlaboron kun Nederlando (kaj Valonio?), kiu necesigos kompletan restrukturigon.

f. *Kongreso*: Ghislain Jacobs ne kapablas digesti ĝeneralajn membrokunvenojn malbone organizitajn kun malgranda partoprenantaro. Oni jam kunvenu ekde la mateno, por ke estu tempo por diskuti kaj decidi. Wim De Smet komprenas, ke la vorto „kongreso” fakte estu komprenata kiel „tuttaga kunveno” kaj promesas, ke venonta kunveno estos laŭ la sugesto.

g-ĝ. *Nacia ekzameno - Kondiĉoj por instrukompetenco*: temoj estas transdonitaj al la Komisiono pri Instruado.

14, 16, 17 kaj 18 forfalas.

15. **Wim De Smet** prezentas la amendojn aprobitajn de la estraro. Al propono de Ghislain Jacobs pri adaptoj rilate al la maksimuma oficperiodo de la prezidanto Wim De Smet respondas, ke por tio unue estus bezonata adapto de la regularo pri interna ordo. La amendita teksto estas aprobita (por: 7, kontraŭ: 0, sindetenoj: 4).

19. Diversaĵoj

* Oni profitu de la enketilo de la VLD, distribuita ĉi-semajne, por atentigi pri la lingvoproblemo en la EU (propono G. Pirlot).

* La klubo de Peer kunlaboras kun LEL (Limburga Esperanto-Ligo)

20. **Post fino de sia laboro** la restantaj administrantoj kuninaŭguras la novan klubojon de La Progreso.

Protokolis Roland Rotsaert.

Estraro, 95.04.17

La estrarkunveno, okazinta la 17an de aprilo 1995 en la Esperanto-centro, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno.

Ĉeestis: Ivo Durwael, Wim De Smet, Johan Van Eenoo, Mark Cuffez, Flory Witdoeck, Jef Geraerts, Walter Vandekieboom.

Malĉeestis: Henny De Ketelaere.

Invitite ĉeestis: Paul Peeraerts.

La prezidanto Ivo Durwael malfermas la kunsidon bonvenigante ĉiujn ĉeestantojn kaj anoncas, ke la trinkaĵoj estos senpagaj. Al la tagordo aldoniĝas punktoj 14 (Diversaĵoj) kaj 15 (Vertikale). Plispecifiĝas la temo de punkto 5 (Komitatano de UEA). Jef Geraerts estas la tempomajstro.

Tagordo

1A. Raporto pri la antaŭa estrarkunsido

La raporto aprobiĝas kun jenaj rimarkoj:
- punkto 3 antaŭtagorda; Se mankas tempo, ni decidu pri kion nun pritrakti;
- tagordpunkto 3 (estrarelekto) reskribiĝas jene:

„Ivo Durwael insistas, ke la elektoprezidanto estu pli bone preparita. Pasintfoje nur dum la administrantarkunsido montriĝis, ke Roland Rotsaert ne kandidatiĝis kiel estrarano, kaj konsekvence estus la elektoprezidanto vole nevole. *Wim De Smet atentigas, ke ekzistas regularo kaj konstatas, ke la elektoprezidanto neglektis apliki ĝin.* Krome la elektokunsido estu malfermita ankaŭ al neadministrantoj. Tiuj

havas nur ĉeestrajton, sed ne parolrajton nek voĉdonrajton. *La estraro konsultu la administrantaron pri tio.*”

- tagordpunkto 4a), b), c), ĉ).

1B. Elspezoj de estraranoj

Retroaktive ĝis 1993 FEL denove rajtas doni fiskaian ateston pro donacoj. Paul Peeraerts pliklarigas. La repagitajn vojaĝ-kostojn la estraranoj rajtas repagi al FEL sub formo de donaco, pruvota per atesto kaj deduktebla de la sekvontjaraj impostoj.

2. Provizora konsisto de la komisionoj

Komisiono pri Informado: Ivo Durwael, Annie Bollaert, Eddy Raats, Germain Pirlot.

Komisiono pri Financoj: Flory Witdoeck, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts. Ĉu Gerd Jacques?

Komisiono pri Eŭropaj Aferoj: Wim De Smet, Christine Tytgat, Flory Witdoeck, Walter Vandekieboom.

Komisiono pri Esperanto-domo: Ivo Durwael, Jacques Schram, Cor van Ekelenburg, Paul Peeraerts.

Komisiono pri Praktikado de Esperanto (agado al ne-esperantista publiko): Walter Vandekieboom, Flory Witdoeck.

Komisiono pri Interna Agado: Marc Cuffez, Ingrid Lievens, Katja Lödör, Ghislain Jacobs.

Komisiono pri Ekstera Agado (internaciaj esperantistaj rilatoj): konsistigo prokrastita.

(por la definitiva komisiaro, vidu V. 9-10, p. 22. Red.)

3. Estraro de BEF

El la informoj de Wim De Smet montriĝas, ke la situacio estas ege nebula kaj ke oni atendas informojn. Necesas larĝa diskuto pri Belga Esperanto-Federacio.

4. Rilatoj kun Esperanto Nederland

La „Nieuwsbrief” de FLE ĉesis aperi. Ekzistas ebleco de kunfandiĝo de la revuoj „Horizontaal” (FEL) kaj „Fenomeno” (Esperanto Nederland).

Ivo Durwael sendos leteron al s-ino Ans Bakker per kiu proponiĝas renkontiĝo por preparoli eblecon de kunlaboro inter Esperanto Nederland kaj FEL.

5. Komitato de UEA

La estraro akceptas Flory Witdoeck kiel komitatano de UEA. Wim De Smet komunikos tiun ĉi decidon al s-ro Sossois.

6. Reprezentiĝo en internaciaj aranĝoj

Wim De Smet reprezentos FEL ĉe la Eŭropa Kongreso en Parizo.

Paul Peeraerts reprezentos FEL ĉe la venonta Trilanda Renkontiĝo.

La problemoj situas pli akre ĉe la reprezentiĝo en ne-esperantistaj aranĝoj, ekzemple „Vlaanderen 2002”, organizota de la 1a ĝis la 11a de julio 1995 kaj inaŭgurota en Oostende. La estraro atendas proponojn de la Komisiono pri Eŭropa Agado.

7. Sinprezento de novaj estraranoj en „Horizontaal”

Tia sinprezento, longa de 10-20 linioj, certe estas konsilinda, kaj nepre kun foto. Oni evitu politikajn aludojn aŭ opiniodeklarojn. La tekstoj nederlandlingvaj atingu la redakcion de „Horizontaal” antaŭ la 1a de junio.

8. Sonorilo

La stoko de Sonorilo, kiun s-ro De Schepper neatendite deponis antaŭ la pordon de Grégoire Maertens en marto 1995, nun troviĝas ĉe Jules Verstraeten. Ivo Durwael demandis, ĉu la FEL-estraro havu starpunkton en la administrantarkunsido de Sonorilo pri ĝia estonteco. Evidentiĝis, ke ne eblas trovi komunan estraran starpunkton.

La familio De Schepper intertempe fondis libroklubon „Karjilono” (ĉu „Kariljono”?) kaj propagandas ĝin kiel la posteulon de Sonorilo. Ni reparaolos kion fari ĉi-rilate dum venonta estrarkunsido.

9. Fondaĵo Van Biervliet

Johan Van Eenoo donas superrigardon pri la ĝisnuna agado por la solvo de la Esperantobiblioteko Kortrijk (raporto pri la kunveno en Kortrijk la 1an de aprilo 1995).

Gravas ankaŭ kontaktoj kun la urbestro, la Skabeno pri Kulturo. Unue nepras tamen reordigi la nunan situacion en la biblioteko.

Wim De Smet mencias, ke s-ino Monique Caestecker el Sleidinge, profesia bibliote-

kistino, pretas prizorgi la bibliotekologian organizadon de la Fondaĵo Van Biervliet.

10. 20 jaroj de oficialaj Esperanto-kursoj en Antverpeno

Kion FEL faros okaze de tiu jubileo? Jen kelkaj ideoj de la estraro:

- renkontiĝo kun la Skabeno pri Kulturo;
- enketo ĉe la gelernintoj; esploro de restintaj adresoj;
- akademia sesio;
- provleciono;
- inviti s-ron Jo Haazen, fondinto de la Esperanto-kursoj en la Quellinstraat. Ekzistas tamen laŭ Wim De Smet dubo pri la komencjaro.

11. Eŭropa Kongreso en Oostende

„La Konko”, la Esperanto-grupo de Oostende proponas organizi venontan Eŭropan Kongreson en sia urbo. Ni opciu 1997, se ne jam envenis solida invito por la EK 1997 de alie. Ni informiĝu ĉe UFE. Ni plie preparolos tiun temon dum la venonta kunsido.

12. Venonta administrantarkunsido

La 25an de junio 1995, prefere posttagmeze, en la junulargastejo de Huizingen okaze de la BEF-okazaĵo „jarpikniko-ĝardenfesto”.

- Eblaj temoj:
- la rolo de la Esperanto-kursoj en la Quellinstraat Antverpeno;
- la datreveno de Unuiĝinta Nacioj;
- kiuj grupoj estas grupoj de FEL laŭ la nova regularo? Kiuj grupoj estas kunlaborantaj grupoj? La estraro starigos sian starpunkton pri tio dum sia venonta kunsido;
- necesaj adaptaj en la regularo pri la estrarelektaj;
- Eŭropa Kongreso en Oostende.

13. Venonta estrarkunsido

La venonta estrarkunsido okazos la 20an de majo 1995 je la 9.30a h. en la Esperanto-domo, Frankrijklei 140, Antwerpen.

14. Diversaĵoj

a) La estraro interkonsentas aperigi la novajn regularojn en „Vertikale” kaj en la Manlibro.

b) Ĉe la manifestacio en Bruselo pro la festo de la 1a de majo ekzistas inform-

stando fare de SAT-Bruselo.

c) La dekreto pri la soci-kulturaj organizaĵoj pritraktiĝis kaj aprobiĝis en la Flandra Konsilio. FEL havas 3 jarojn por adaptiĝi al la nova dekreto.

ĉ) Wim De Smet reprezentos FEL dum alĝazetara prezento en Bruselo pri la projekto „Vlaanderen 2002”.

d) UN - 50a datreveno. Projektoj endoniĝu ĝis la 30a de majo 1995.

ø) La sekretaria raporto 1994-1995 publikiĝos en „Vertikale”.

La prezidanto Ivo Durwael fermas la kunsidon je la 18.10a h.

Raportis Johan Van Eenoo.

Estraro, 95.05.20

La estrarkunsido de sabato la 20a de majo 1995.

La kunsido okazis en la Esperanto-centro Antverpeno kaj komenciĝis je la 9.35a h.

Ĉeestis: Ivo Durwael, prezidanto; Wim De Smet, vicprezidanto; Flory Witdoeck, kasisto; Walter Vandekieboom kaj Henny De Ketelaere, estraranoj.

Pardonpetis: Johan Van Eenoo, sekretario; Marc Cuffez, vicsekretario kaj Jef Geraerts, estrarano.

Pro la neĉeesto de la sekretario kaj vicsekretario la vicprezidanto akceptis redakti la raporton.

La prezidanto esperas provi fini la kunsidon je la 12.30a h., kaj certe plej laste je la 13a h., kvankam la programo estas sufiĉe ampleksa. Li tial insistas, ke dum la diskutoj oni restu ĉe la temo por ne endanĝerigi tiujn tempolimojn; la vicprezidanto ege subtenas tion.

Necesas cetere aldoni kelkajn erojn:

- iu decido pri la plej bona uzo de rezervo de usona mono; tio povus esti pritraktata post tagordpunkto (top) 5;
- la enhavo de la administrantarkunsido de BEF de la sekvonta sabato povus veni post top 1 kaj iĝi top 1B;
- diversaĵoj formos top-n 14 kaj decido pri la estonta estrarkunsido estos top 15.

Tempolimoj estas indikitaj por la diversaj top-j kaj Flory Witdoeck estas petata ĝustatempe atentigi pri ilia alproksimiĝo.

1. Raporto pri la estrarkunsido de la 17a de aprilo 1995

Oni konsentas ĝenerale pri la enhavo de la raporto, sed oni ankaŭ konstatas, ke pluraj korektoj devas esti farataj:

- enkonduko: 1a linio: *estrarkunsido* (mal-korekte skribita);

8a linio: *kunsidon*;

9a kaj 10a linioj estu anstataŭataj jene: ... *kaj anoncas, ke la trinkaĵoj estos senpagaj.*

7a kaj 8a linioj: la terminoj *mal-ĉeestis* kaj *invitite ĉeestis* ne havas ĝeneralan aprobon, sed povas resti;

- top 1A: antaŭlasta linio: *administrantaron* (m.s.);

- top 1B: dua linio: *repagi* (ne: *retropagi*);

- top 2: la titolo estu: *Provizora konsisto de la Komisionoj*;

- top 3 (estraro de BEF): unua linio: ... *montriĝas, ke oni atendas informajn.* (anstataŭ: ... *montriĝas, ke la situacio estas ege nebula.*);

- top 4: 1a linio: *kunfandiĝo* (m.s.);

3a linio: *proponante* (m.s.);

- top 5: la termino *komitatanino* estas nekutima, sed allasebla;

- top 7: 3a linio: ... *antaŭ la 1a de junio* (m.s.);

- top 8: 6a linio: la de P. De Schepper uzita vorto estas *Karjilono* (ne: *Kariljono*) por esprimi *Kariljono*;

7a linio: *posteulon* (m.s.);

- top 9: 6a linio: ne Ivo Durwael, sed Wim De Smet; oni forigu la vorton *iu*;

- top 10: titolo: *25 jaroj* (m.s.);

6a linio: *Haazen* (m.s.);

- top 11: 2a linio: *solida invito* (m.s.) (iom nekutima esprimo);

- top 12: 3a linio: *eblaj temoj* anstataŭ *temo*;

- top 14b: post la komo oni anstataŭu per: ... *ekzistas informstando fare de SAT-Bruselo.*

Pro la sufiĉe multaj ŝanĝoj, kiuj devos esti farataj estos preferinde, ke nova versio de la raporto estu sendata al la estraranoj.

Wim De Smet atentigas, ke intertempe ankaŭ ekzistas raportoj pri la jarkunsido kaj la du administrantarkunsidoj de la 11a de marto 1995, kaj ke la estraro prefere

OPINIE

Polemiko politika

En la revuo „Horizontaal” aperis polemiko inter la redaktoro Guido VAN DAMME kaj kelkaj gravaj esperantistoj pri „politikaj amikoj”. Interesega polemiko, precipe ĉar ĝi rilatas al la kunmetado de akvo kaj fajro, pri politikistoj (ne temas pri politikaj filozofoj) kaj Esperanto.

Komencinte la debaton, ni kompreneble devas respondi al la demando, ĉu Esperanto estas nur lingvo, aŭ ĉu ni sen honto povas paroli pri Esperanto-filozofio?

Se Esperanto estas nur lingvo, ni sen problemoj povas forvendi tiun lingvon dum ĉiu ajn „tripo-kermeso”, sciante, ke tie, certe dum la antaŭbalota tempo, ni renkontas sufiĉe da politikistoj kun plenplena skatolo da promesoj kaj mensogoj.

Ankaŭ grave estas, ke ni atingas kiel eble plej multe respondantoj, estontaj uzantoj, ĉar temas ja pri internacia komunikilo, ĉu ne? Forvendi mondlingvon signifas, ke ni devas venki peze subvenciitajn lingvojn kiel la angla, la franca, la portugala, la hispana k.t.p.

Mi jam diris, ke la celo estas atingi la plimulton, do, ek al la „St.-Jansplein-bazaro” ege proksima al la stabejo de la plej granda politika partio de Antverpeno.

Ĉu mi daŭrigu, aŭ ĉu vi jam komprenas, ke mi ne ŝatas politikistojn? Ne nur ĉar mi dum jaroj aktivis en la sindikato, kie mi renkontis tro multe da aspirantoj, kaj mi konstatis, ke ne mankas aspirantoj por bonaj pagitaj politikaj postenoj. Sed verajn kompetentulojn mi ne vidis kaj kredu min, ne estas nur tial, ke mi ne povas fidi la politikistojn. Se mi nur povus forĵeti, rigardante la T.V.-novaĵon, tiun nehaltigeblan naŭzon por tiuj homoj. La mizero en la mondo, la infanoj kiuj mortas - ĉu vi scias, ke ĉiun SEKUNDON mortas infano pro malsato aŭ militaj agoj? Ĉu la politikistoj ne respondecas pri tiuj aferoj, same multe kiel Chirac respondecas pri la nukleaj eksperimentoj okazintaj ne en la Seino, sed bedaŭrinde por la enlogantaro de la pacifikaj insuloj, malproksimege de Parizo?

Kompreneble ni mem elektas(is) nian parlamenton, sed ĉu tio garantias ion? Hitler estis elektita tute demokrate, ĉu ne? Ulrich Lins mencias tion en sia libro „La Danĝera Lingvo”. Sur paĝo 105 en la ĵus menciita libro vi vidas foton el la jaro 1933 de la ĉefurbestro de Kolonjo, Günter Riesen, ornamita per svastiko, alparolante la kongresanojn de la 25a U.K. Tio, kio tiam okazis, povas okazi denove, ĉar neniam malaperas el la mondo la homoj, kiuj kondamnas homojn pro iliaj haŭtkoloro, gento aŭ deveno, kaj nur por plaĉi al la elektantaro, por ĝui la favoron de la amaso, ĉiam revenas tiuj politikistoj, kiuj, kiel antaŭ 50 jaroj mortigis tiom da milionoj da virinoj, viroj, infanoj. Viktimoj pro la fakto, ke ili kredis en la „malgusta dio”, sed ankaŭ - kvankam ne tiel multe - viktimoj de tiu sama maltolerema sistemo, kiuj volis disvastigi senpotencan universalan lingvon,

aŭ ĉu ili devis malaperi en la infernon de la koncentrejo pro la fakto, ke ili estis idialistoj, kiuj volis disvastigi internacian ideon de toleremo, interfratiĝo kaj pere de Esperanto neŭtralan lingvon universalan?

Eĉ ridindigita de la tuta politika adeptaro, eĉ kiam mi kiel Donkiĥoto devas kontrabatali la muelejojn de nekomprenebleco, mi restas ĉe mia ideo, ke Esperanto estas pli filozofio ol lingvo, kaj pro tio estis persekutita de tiel multaj potentatoj dum ĝia ekzisto.

La danĝero de Esperanto troviĝas en ĝia relativa facileco. Homoj, kiuj ne kapablis lerni fremdan lingvon, povas atingi kontentigan nivelon en Esperanto. Per kontentiga nivelo mi volas diri: nivelo sufiĉe alta por ke la persono povu kompreni sin al aliaj esperantistoj.

La danĝero troviĝas en la fakto, ke se la amaso, kiu nun sidas, kaj mi ne timas diri tion, rigardante malaltnivelajn programojn sur la kvadrata suĉilo por plenkreskuloj, sur la televido, se tiu amaso penus lerni Esperanton - mi nun pruntas frazon de E. Drezen la fama rusa esperantisto - „riskas kleriĝi kaj forlasi la fiksitajn kadron de lojaleco”. Kaj tie troviĝas la nodo.

Kelkaj esperantistoj volas, ke Esperanto iĝu la nova eŭropa lingvo, kaj bazaras kun la lingvo, kiu por sufiĉe da homoj estas idealo, ĉe homoj malfidindaj, ĉe homoj, kies nura celo estas gajni la favoron de la amaso, kaj por atingi la celon ili devas malfermi la artifiko-skatolon de malhonesteco, aŭ iri al ĉiu ajn tripokermeso kaj bier-festo. Ne gravas, se ili nur post la balotado povas enlitiĝi kun aliaj potentatoj, kiuj ankaŭ nur voluptamos al potenco, forjetante anticipe la iaman filozofion kaj konvinkon de la partia fundamento aŭ partia intereso.

Mia opinio pri Esperanto estas, ke ni havas en la mano valoregan komunikilon, ne nur lingvon, ĉar lingvo ne sufiĉas por kunigi homojn, sed komunikilon filozofian jes.

Se vi volas doni al tiu filozofio nomon, ne gravas: Hilelismo, Homaranismo, interna ideo; iu ajn nomo, tio al mi egalas, se ni nur ne forgesas, ke iam iu kreis lingvon neŭtralan kun fundamento de egaleco inter homoj.

Jacques Schram,
S.A.T.-ano.

P.S. Etan parton el la parolo de d-ro Zamenhof dum la 4a U.K. en Germanio (Dresdeno):

„Niaj pioniroj laboris, kaj la afero kreskis. Baldaŭ ni ĉiam pli kaj pli akiradis la konvinkon, ke de teoriuloj ni devas atendi tre malmulte da bono por nia afero; ke ĉiuj laŭdoj kaj mallaŭdoj de flankaj personoj havas por ni nur tre malgrandan signifon; ke ni devas fidi nur niajn proprajn fortojn, niajn proprajn paciencon kaj konstantecon; ke la mondo venos al ni nur tiam, kiam ĝi vidos en ni potencon, kiam ĝi vidos, ke ni ne palpas en mallumo, ke ni ne perdas hodiaŭ, kion ni akiris hieraŭ, ke nia vojo estas klara kaj rekta kaj ni de ĝi neniam deflankiĝas.”

L.Z.

baldaŭ pritraktu ilin. La estonta estrarkunsido faros tion; ekzempleroj estos havigataj al la novaj estraranoj.

1B. BEF

La administrantaro de Belga Esperanto-Federacio havos kunsidon venontan sabaton, la 27an de majo, en la posttagmezo, en la Esperanto-centro. Wim De Smet, vicprezidanto ankaŭ de BEF, komunikas, ke ĝis nun li ne estis ricevinta la programon de tiu kunsido, sed ke li scias pri ĝia enhavo. Ĉefe kelkaj ĝeneralaj problemoj de BEF estos pritraktataj. Sed oni ankaŭ pritraktos du punktojn, kiuj rilatas rekte al FEL: la propono, ke Flory Witdoeckt estu unu el la du BEF-komitatoj, kiujn oni rajtas delegi al la UEA-komitato, kaj la propono, ke en 1997 okazu Eŭropunia Esperanto-Kongreso en Ostendo. Wim De Smet komunikas, ke li jam preparolis tiujn du aferojn kun la BEF-prezidanto, Georges Sossois, kaj ke tiu favore reagis, tiel ke oni povas atendi, ke la du proponoj estos favore akceptataj de la BEF-administrantaro. Wim De Smet kaj Georges Sossois cetero jam estis preparolintaj diversajn aferojn okaze de renkontiĝo inter la du en aprilo.

2. FEL-projektoj por la 50-jarfestoj de Unuiĝintaj Nacioj

La antaŭa estraro jam estis notinta la eblecon akiri subvenciojn de la Flandra Komunumo por festi la 50an datrevenon de la kreiĝo de Unuiĝintaj Nacioj kaj la antaŭa estrarkunsido estis atentigita pri tio. Wim De Smet intertempe jam estas akirinta pliajn informojn kaj Ivo Durwael estas redaktinta tekston pri du eblaj projektoj: speciala numero de „Horizontaal” (tiu de septembro 1995) kaj kolokvo pri lingvaj problemoj en la mondo. La du projektoj montrigas esti realigeblaj kaj esti favoraj por konigo de la rolo de FEL kaj de la lingvo Esperanto.

Flory Witdoeckt prenos kontaktojn kun la respondeculo (s-ro Ruysseleer) en la Administracio de Eksteraj Rilatoj de la Flandra Komunumo kaj submetos al li porinforme niajn du proponojn. Kiam oni havos favorajn signalojn oni elaboras plie. La broŝuro aperu en 5.000 ekzempleroj kaj enhavu eĉ kolorfotojn. Por la kolokvo oni serĉu altkvalitajn parolantojn.

Wim De Smet, Flory Witdoeckt kaj Walter Vandekieboom preparolos tion baldaŭ kun Claude Piron en Parizo. Walter Vandekieboom insistas pri originaleco en niaj ideoj por tiu kolokvo. La ekzemplo de la kontaktaj de Flory Witdoeckt en Ĉinio por konigi tie belgajn industriojn meritas atenton kiel programpunkton.

3. Sinprezento de la estraranoj en „Horizontaal”

Ivo Durwael memorigas, ke baldaŭ la estraranoj havigu mallongan biografion kaj foton por ĝenerala konigo de la estraro al la FEL-membraro.

4. Novaj dekretoj por subvencio

Ivo Durwael komunikas, ke oni disponas pri la tekstoj de la tri novaj dekretoj de la Flandra Komunumo, kiuj anstataŭos la antaŭajn post transirperiodo de tri jaroj. Plej bone povus taŭgi por ni la Dekreto por la Servocentroj; ni sen tro da problemoj povos plenumi la bezonatajn kvin bazofunkciojn de tia centro. La tekstoj estos kopiataj kaj havigataj al ĉiu estrarano, tiel ke iun sekvontan fojon ni povos pli atente preparoli tion.

5. Komisionoj

La komisionoj devus nun eklabori.

- Al tiu de Eŭropa Agado (sub la respondeco de Wim De Smet) aldoniĝis Edward Symoens; ĝi intencis kunsidi dum tiu ĉi tago, sed pro cirkonstancoj tio estas prokrastita.

- Tiu de Interna Agado kunsidos la 25an de junio en Huizingen dum la BEF-festo; ĝi konsistas el Marc Cuffez, Ingrid Lievens, Katja Lödör kaj Ghislain Jacobs.

- Tiu de Eksteraj Rilatoj, konsistanta el Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Frans Croon kaj Paul Peeraerts, kunsidis la antaŭan tagon; Ivo Durwael havigas raporton pri tio kaj oni ekscias i.a. ke propono de Symoens pri informfolioj estas aprobata; la estraro konsentas pri la diversaj proponoj (*), kvankam Wim De Smet insistas, ke FEL daŭre preferu tekstojn de flandra deveno (kiel tion implicas la ekzistobazo de FEL).

- Je la demando de Wim De Smet, ĉu estas formita iu redakta komitato de „Monato” laŭ la direktivoj de la komisionkunsido de la 19a de decembro 1994, oni

ekscias, ke tiu komitato nun ekzistas kaj ke ĝi konsistas el: Paul Peeraerts (B), Anne Tilmont (B), Eddy Raats (B), Alex Humet (B), Mark Fettes (CDN) kaj Philippe Cousson (F); Wim De Smet miras, ke tio ne estas komunikita al la FEL-estraro, kiu fakte respondecas pri Monato.

- La Komisiono pri Financoj ĝis nun ne estas kunsidinta, sed iu financa problemoj devus esti baldaŭ decidota, nome la stato de FEL-mono (fakte de „Monato”) en usona banko. Ekestas la propono vendi ĝin, tio pro la malcerta kurzo de la usona dolaro. Pluraj estraranoj, kaj ĉefe Walter Vandekieboom (per bonaj argumentoj) preferas ne fari tion; sekve de tio oni prokrastas iun decidon kaj oni petas la komisionon baldaŭ kunsidi kaj bone analizi la por-aĵojn kaj la kontraŭ-aĵojn de la konservado de tiu mono.

6. Esperanto-kursoj de la urbo Antverpeno

Pro la 25-jara ekzisto de tiuj kursoj valorus, ke oni festu tion ĉi-jare. Ivo Durwael preparolis tion kun la direktorino de la vesperaj kursoj (s-ino Snels). Sekve de tio estas antaŭvidita renkontiĝo kun la nova Skabeno pri Instruado, s-ro Verstraelen, je la 31a de majo. Oni povus antaŭvidi akademian kunsidon en septembro kun akompana informada kampanjo. Ivo Durwael lasu sin akompani de iuj aliaj por tiu vizito (pluraj nomoj estas citataj).

7. Laborplano por Eŭropa Agado

FEL estas ricevinta ekzempleron de tiu laborplano (de UEA) kaj Ivo Durwael proponas, ke oni agu laŭ ĝi. Wim De Smet pristudos la tekston.

8. Kongreso en Ostendo

La Esperanto-grupo de Ostendo principe estas preta organizi la 3an Eŭropunian Esperanto-Kongreson supozeble en 1997, sed konfesas ne havi spertojn pri tio. Flory Witdoeckt kaj Walter Vandekieboom tial ŝatus unue vidi la funkciadon de tia kongreso en Parizo (Pentekosto 1995). Wim De Smet atentigas, ke en la organizado ankaŭ devas interveni FEL kaj BEF, plus membroj de aliaj Esperanto-grupoj. Laŭ ricevita informoj ĝis nun ne estas kandidatoj por tia 3a kongreso kaj do invito fare de la ostendanoj estos supoze-

ble bona; li tial insistas, ke oni ne plu hezitu pri la principo se la ostenda grupo sentas sin sufiĉe motivata. Oni konsentas direkti inviton por Pentekosto 1997. Venontan semajnon la BEF-administrantaro preparolos tion kaj baldaŭ la FEL-administrantaro ankaŭ.

9. Rilatoj kun „Esperanto Nederlando”

La FEL-estraro estas ricevinta inviton partopreni per delegacio en estrarkunsido de „Esperanto Nederland”, kiu okazos je la 10a aŭ la 17a de junio, antaŭvideble en Utrecht. Priparoliĝos novaj formoj de kunlaboro inter la du, ekzemple por komuna revuo. Oni konsentas, ke la delegacio konsistas el Ivo Durwael, Wim De Smet, Flory Witdoeckt kaj Walter Vandekieboom.

Post tio sekvas paŭzo, dum kiu Ivo Durwael telefonas al Nederlando. Montriĝas, ke la kunsido okazos je la 17a de junio en Roterdamo.

10. Administrantarkunsido de FEL

La sekvonta kunsido okazos dum la BEF-tago de la 25a de junio en Huizingen kaj komenciĝos je la 10.30a h. Oni preparolos jenajn tagordpunktojn:

1. Festado de la 25-jara ekzisto de urbaj kursoj en Antverpeno;
2. Programo de memorado de 50-jareco de la Unuiĝintaj Nacioj;
3. Propono okazigi Eŭropunian Kongreson en Ostendo en 1997;
4. Konformeco de niaj Esperanto-grupoj kun la regularo de FEL pri tio;
5. Ebla ŝanĝo de iu ero de la regularo pri la administrantaro.

Ivo Durwael petas al Wim De Smet, ke li bonvolu gvidi la diskutojn pri la punktoj 4 kaj 5; Wim De Smet akceptas.

11. Sonorilo

Ivo Durwael kaj Wim De Smet raportas pri la administrantarkunsido kaj Ĝenerala Kunsido de la asocio „Sonorilo” je la 13a de majo. La asocio pluekzistas kaj decidis pri sia plia agado poste. La Familio De Schepper nun ne plu okupas sin pri la librovendado; la libro nun estas konfiditaj al la zorgo de la nova direktoro, Cor van Ekelenburg. Specialaj aranĝoj estas konsentitaj kun FEL pri librovendado en la

diversaj cirkonstancoj.

Oni konstatas, ke Patrick De Schepper kun familianoj propriniciate entreprenas Esperanto-agojn, i.a. anoncante, ke lia librovendejo (nun korekte nomita: „Kariljono”) estas la posteulo de Sonorilo, kaj varbante abonojn de revuoj, kiujn li ne transdonas al la revueldonantoj.

Ivo Durwael kaj Wim De Smet konfirmas, ke ĉiaj siatempaj provoj por interkonsenti kun la familio De Schepper fiaskis kaj ke necesas nun aktive informiĝi pri ĉiaj mal-konvenaĵoj, kiujn tiuj personoj eble faros; Ivo Durwael cetere jam sendis nome de FEL leteron al ili proteste kontraŭ malĝusta informo, kiun ili disvastigas.

12. 11-tagaro de la Flandra Komunumo

Ivo Durwael informas pri tiu iniciato de la Komunumo kaj Wim De Smet rakontas pri la gazetara konferenco, kiun li partoprenis. Ambaŭ opinias, ke estus bone, ke eĉ ĉi-jare FEL jam entreprenu ion rilate al tiu programo. Montriĝas ke je vendredo la 7a de julio (do ĝuste en la antaŭvidita periodo) en La Verda Stelo prelegos s-ro Cwik pri eŭropaj aferoj, kaj ke oni povus uzi tiun cirkonstancan por transformi ĝin al FEL-aranĝo dezirante, ke s-ro Cwik multe prientenu la rolon de Flandrio en Eŭropo. Wim De Smet, Flory Witdoeck kaj Walter Vandekieboom priparolos tion kun s-ro Cwik, kaj poste la FEL-estraro faros la necesajn paŝojn. En la venontaj jaroj ni devos multe priententi tiun ĉi novan iniciaton kaj tiel bone enkadrigi en la programoj de la Flandra Komunumo.

13. Agotago de Esperanto

Ivo Durwael estas ricevinta peton de UEA prepari iun programon de agado je sabato la 7a de oktobro. Oni opinias, ke la antaŭvidita kolokvo (vidu sub 2.) povus esti bona iniciato tiurilate. Ni atendu pliajn informojn.

14. Diversaĵoj

1. En septembro nia honora prezidanto Edward Symoens iĝos 80-jara. Lia filino Griet intencas prepari iun specialan feston en Esperanto-medio. Wim De Smet atentigas, ke „La Erikejo” ankaŭ deziras festi lin dum sia septembra kunsido.

2. Germain Pirlot estas alskribanta Eŭro-parlamentanojn por ekscii iliajn opiniojn

pri la lingvaj problemoj kaj li dezirus, ke FEL iam publikigu iliajn leterojn. La iniciato akiras konsenton.

3. Henny De Ketelaere raportas pri la Kulturkonsilio de Antverpeno, kiu intencas atribui specialan atenton al la verkaro de la poeto Paul Van Ostaeyen. Wim De Smet atentigas, ke ekzistas pluraj Esperanto-tradukoj de liaj poemoj. Oni sekvu tiun iniciaton (kiu?).

4. Speciala atento estas petata pri la kursoj de la venonta sezono, por ke ni bone promociu ilin.

5. Walter Vandekieboom substrekas la neceson nun bone agi sur la kampo de unuiganta Eŭropo kun la ideo de federalismo.

15. Venonta estrarkunsido

Proponate estas: je sabato la 17a de junio je la 9.30a h. en la Esperanto-centro (tago de la vizito al la estrarkunsido de EN - vidu sub 9.).

Raportis Wim De Smet.

(* Konkludo de tiu komisionkunsido:

La komisiono apogas la eldonan agadon de FEL kiel kontribuon al la famigo de Flandrio kaj al starigo de internaciaj rilatoj.

La komisiono proponas la eldonadon de originalaj verkoj kaj de verkoj tradukitaj el la nederlanda literaturo kaj de klasikaj verkoj al Esperanto.

La komisiono aprobas la eldonagadon de verkoj el aliaj lingvoj, kondiĉe ke tio ne kolizias kun la eldonagado de aliaj landaj Esperanto-asocioj.

La komisiono proponas, ke la direktoro de la centro memstare rajtas entrepreni la necesajn paŝojn por la eldono de kvar verkoj, kiuj havus entute 800 paĝojn en unu jaro. Se li sentas bezonon por transpasi ĉi tiun limigon, li denove konsultu la estraron.

Detaloj: Esperanto-dokumento en la itala de Symoens; oni serĉu kunlaboron kun IEF.

- La projekto de Symoens: oni eldonu la tekstojn nederlandlingve; ni proponos al aliaj landoj, ke ni volas eventuale disponigi tradukojn sub difinitaj kondiĉoj.

- Dokumentoj Sikosek: eldoni kiel Esperanto-dokumenton en limigita nombro de ekzempleroj (200?).

RAPORTE - ALIAJ

Fondaĵo Vanblervliet, 95.07.15

Kunveno je 15.7.1995 en la biblioteko de Kortrijk.

Jus antaŭ la UK de Tampere okazis kunveno de kunlaborantoj kies raporto sekvas:

Ĉeestis: Jean-Pierre Allewaert, Danielle Demeyere, Piet Glorieux, Roland Rotsaert (raportanto), Camiel Van Biesen, Johan Van Eenoo.

Ne povis veni: P. De Backer (skribe komunikis ideojn).

Nuna situacio

Se dum la venontaj semajnoj venos kelkaj volontuloj, la situacio estos pli malpli ordigita. Kio estas la posta tasko?

Translokiĝo al alia ejo (en la kortrejka biblioteko)

Plej urĝe ŝajnas la translokiĝo al alia ejo. Tio i.a. donos eblecon plibonigi la ordigon de la kolekto. Tio evitos multe da rondkurado. P. De Backer ne entuziasmas pri alia ejo: ni estos inter aliaj kolektoj. La ĉeestantoj opinias, ke la avantaĝoj de translokiĝo estas pli grandaj ol la malavantaĝoj. Roland Rotsaert povas liberigi sin dum periodo 31.8-9.9.95; aliaj ankaŭ (parte); ostendanoj interesiĝas pri „laborvizito”. Danielle Demeyere interkonsentas kun la bibliotekestro kaj informos Roland Rotsaert kiam la nova ejo estas disponebla.

Ne jam solvita problemo: ĉu la ordigo estu tute alfabeta aŭ laŭ temo? Tasko farebla iom post iom, post la translokiĝo.

Aŭtomatigo de la biblioteko: CDS-ISIS

Ĉar la „oficialaj” bibliotekprogramoj estas nefidindaj kaj/aŭ rapide evoluantaj, ŝajnas plej oportune uzi la senpagan, stabilan, internacie konatan programon CDS-ISIS, malgraŭ kelkaj mankoj. Roland Rotsaert baldaŭ de VUB (Vannieuwenhuysen, Vanouplines) ricevos pli da informoj pri CDS-ISIS, kun i.a. elektronika adreso de Internet-diskutejo. Por adapti CDS-ISIS al niaj bezonoj, necesas, ke kelkaj volontuloj

bone konas ĝin. Okazos kurso en Gent (8 mardoj - tuttage - en oktobro/novembro). Kosto: po 5.000 BEF (eble la biblioteko subvencios, se ne La Konkordo pretas pagi tra subvencia konto ĉe FEL).

Ĉefa problemo: kursejo estas malfacile atingebla (Antwerpsesteenweg 573, 9040 Gent). Ankaŭ *Provinciale Bibliotheek WV* kaj *Vlaamse Gemeenschap* uzas CDS-ISIS. Roland Rotsaert kaj Johan Van Eenoo informpetos pri aliĝo al eventuala tia kurso. Se dum la UK ekestus intereso pri CDS-ISIS, eble pripenseblas kurso nur por esperantistoj.

Subvencioj

Roland Rotsaert atentigas pri ekzisto de fondaĵoj (Fame en Carson), kiuj povas finance helpi, se la biblioteko havas iun gravan projekton.

Diversaĵoj

- Alvoko tra *Platform voor Voluntariaat* ne havigis volontulojn.

- Germano ofertis sian kolekton: Jean-Pierre Allewaert sendos provizoran respondon.

- Bulgaro kompilas Esperanto-enciklopedion kaj petis informojn pri la Fondaĵo. Piet Glorieux verkos tekston.

Universala Kongreso

Neniu kongresano spontanee kontaktis min por paroli pri la Esperanto-bibliotekoj kaj/aŭ pri CDS-ISIS. Al eta cirkulero dissendita tra kongresa kuriero al 15 bibliotekistoj (laŭ kongresa libro) venis nur kelkaj, neutilaj, reagoj. Mi kelkfoje parolis pri la Esperanto-bibliotekoj, CDS-ISIS, kaj ebla rolo de Unesko, dum kongresaj kunvenoj. Sekve kelkaj personoj diverslandaj mendos CDS-ISIS en sia lando kaj raportos pri tio.

Reagoj al antaŭa cirkulero

Al antaŭa cirkulero, dissendita fine de junio, venis reago nur de la 2 jam konataj bibliotekoj en Germanio kaj Hispanio. Ĉu konkludi, ke nur tiuj bibliotekoj kontentige funkcias? (La cirkulero ankaŭ aperis en revuo Vertikale de Flandra Esperanto-Ligo, aperinta nur antaŭ kelkaj tagoj.)

Uzota programo

Intertempe iom post iom alvenas pli da informoj pri CDS-ISIS, kiuj pruvas, ke ĝi certe estos taŭga kaj internacie uzata programo por bibliotekoj. Interŝanĝoj kun aliaj bibliotekprogramoj eblas (kvankam sperto estas bezonata por tio). Antaŭ 5 jaroj la tuta menuaro de CDS-ISIS estis tradukita esperanten de s-ino Ankica Jagnić por uzo de Terminologia Centro de UEA. Ĉu tio laboro estas reuzebla? Mi mendis la piej novan version (3.07) ĉe la belga distribuanto; kontraŭe al la antaŭvidoj, ĝi ne estas senpaga, sed la prezo korespondas kun t.n. shareware (500 BEF; diversaj aldonaĵoj aparte pagendaj). Mi demandas min, kio estas la sperto de alilandaj mendantoj.

Flanke de Danielle Demeyere (bibliotekistino en Kortrijk) venis la sugeston tamen uzi la tutlandran bibliotekprogramon kaj uzi CDS-ISIS nur por interŝanĝoj. Denove esplorenda; ankaŭ la aliaj Esperanto-bibliotekoj povus agi simile kaj konservi la jam konatan programon. Ambaŭ solvoj havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn.

Venontaj laboroj

La translokiĝo dependas de aliaj sekcioj de la biblioteko kaj ne tuj eblos.

Intertempe restas sufiĉe la ordiga kaj prepara laboroj. Kelkaj specialistoj esploru kiujn informojn pri la libroj devas esti registritaj kaj kiamaniere eblas interŝanĝi la jam entajpitaj informoj inter la bibliotekoj (por eviti pluroblan laboron).

Registrad-skemoj por CDS-ISIS ekzistas. Ŝajnas konsilinde komence limigi sin al libroj.

Ĉar ne troveblas taŭga kurso, kelkaj personoj devos akiri sperton pri CDS-ISIS per memstudado.

Mi intencas inter fino de septembro kaj komenco de novembro viziti la germanan kaj hispanan bibliotekon por surloke interparoli kun la respondeculoj.

Ne ŝajnas utile denove sendi la cirkuleron al ĉiuj konataj Esperanto-bibliotekoj. Anstataŭe mi preparos artikolon por la revuo Esperanto (kompletigan al tiu pri Biblioteko Hodler, kiu antaŭ nelonge aperis).

Raportis Roland Rotsaert.

OKAZINTE

25-jariĝo de la vesperkursoj

Jam dum 25 jaroj oni instruas Esperanton en la urba lernejo en la Quellinstraat per vesperkursoj. Por festi tion, kaj por doni novan instigon, akademia kunsido okazis. Sufiĉe multaj homoj ĉeestis, esperantistoj kaj ne-esperantistoj, kiuj aŭskultis al la esperantaj muzikaĵoj de la grupo Akordo, kaj al la vortoj de pluraj parolantoj.

Post enkonduko de la FEL-prezidanto Ivo Durwael unue parolis Hilde Snels, direktorino de la vesperlernejo, pri la fondiĝo de la kursoj, kaj sia espero pri la estonteco.

Tiam venis s-ro Verstraelen, Skabeno pri Instruado. Laŭdinda estis lia peno por paroli iom en Esperanto, kvankam li - laŭ propra diro - ne komprenis tion, ankoraŭ ne. Li do daŭrigis nederlandlingve kaj skizis la situacion de la Esperanto-kurso kaj ĝia ekesto.

Poste parolis Jo Haazen, prezidinto de la antverpena esperanto-klubo *La Verda Stelo*, instiginto kaj kunfondinto de la kursoj. Li (iom tro) larĝe pritraktis (esperantlingve) la historion de Esperanto-instruado en Eŭropo ekde la komenco en la antaŭa jarcento ĝis nun.

Agnes Geelen, reprezentante la gelørnantojn de dum 25 jaroj, rememoris siajn spertojn dum kaj post la lernado, kaj ne forgesis danki la tiamajn kaj nunajn geinstruistojn.

Ke Esperanto estas saniga, pruvas la fakto, ke estas kvar 80-jaruloj, kiuj daŭre restas aktivaj: Jules Verstraeten, Rik de Roover, Edward Symoens kaj Clementine De Cuyper. Oni celebris ilin.

Fine de la kunsido Jacques Schram, prezidanto de la antverpena klubo, honorigis Rik de Roover, eksinstruiston de la vesperlernejo per inter alie transdono de libreto kun ties rakontoj, *La Ruĝa Hirundo*. Edward Symoens oni festis okaze de lia naskiĝtago en la vespero en la esperanto-klubo *La Verda Stelo*. Lia filino Griet kiel donacon organizis ĉion.

Certe estis agraba kaj instrua tago.

Raportis Cor van Ekelenburg.

REAGE

Malferma Letero al Malkontenta Aktivulo

Dato: 1995.10.09

Kara Amiko,

Antaŭ kelkaj tagoj mi aŭdis nerektan plendon de aktivulo, kiu malkontentas pri FEL: kial en la centro laboras pluraj homoj, kiuj nur malmulton faras por la lokaj kluboj; kion FEL faras per la mono de la membrokatoj; kial FEL ne donas pli da financa helpo ...

Kara amiko, inter la aktivuloj mi renkontis ĝis nun nur ĉarmajn, sindediĉajn homojn. Ankaŭ la oficistoj en la centro estas afablaj kaj sindediĉaj. Se mi do aŭdas acidajn rimarkojn pri la centro, mi imagas al mi, ke tio fontas nur el manko de informoj aŭ miskomprenoj. Tial mi mencias aron da faktoj pri FEL, kiujn vi sendube ne konas.

Unue, mi volas mencii, ke FEL ricevas subvenciojn pro la aktivecoj en la centro kaj de la lokaj kluboj. Sed tiu subvencio konsistas el repago de (preskaŭ) unu salajro por unu oficisto. Tiu oficisto do laboru por la Esperanto-vivo en Flandrio. Unu oficisto laboras dum 237 tagoj en la jaro kaj dum 7,5 horoj en la tago. Entute li aŭ ŝi laboras proksimume 1777,5 horojn en unu jaro.

En la centro en Antwerpen la oficistoj notas kion ili faras kaj dum kiom da horoj. Mi notis kelkajn ciferojn. Evidente ili povas varii de jaro al jaro kaj do neniam estas ekzaktaĵ.

Horizontaal (redaktado, kompostado, ilustrado, enpaĝigo, presado, kolektado, afranko)	500 horoj
Vertikale	30 horoj
Esperanto-dokumento (represo, enpaĝigo nova dok.)	65 horoj
Membroadministrado	165 horoj
Libroservo (aĉetoj, registrado, vendado, fakturado, forsendoj, inventaro)	500 horoj
Informado (personoj, kiuj vizitas la centron; personoj, kiuj petas informojn kaj ofte ricevas personan leteron; verkado de artikoloj)	50 horoj
Gazetara servo (verkado, dissendado)	20 horoj
Kontaktoj estraro (dissendo invitleteroj, personaj leteroj)	20 horoj
Specifaj kontaktoj (instancoj, altrunguloj, aliaj movadoj)	20 horoj
Biblioteko (enkomputiligo, ordigo, pritrakto revuoj)	100 horoj
Perlaboro instrukcioj de la ministerio (i.a. instrukcioj subvencioj, leĝo pri privateco ktp)	100 horoj
Kontroloj librotrenado (revizoro, inspektoroj)	15 horoj
Pretigo subvenciosiero	200 horoj
Malgrandaj preslaboroj (leterpapero, afiŝoj ktp)	20 horoj
Elaborado de novaj komputilprogramoj por administri ĉion	50 horoj
Enordigo kaj purigo	100 horoj

Sendube, mi forgesis ankoraŭ aron da malgravaĵoj, sed mi tamen jam kalkulis 1.955 horojn. Vi vidas, ke la subvencio certe ne sufiĉas por pagi la kostojn de oficistoj, kiujn ni bezonas por fari la administrajn laborojn de FEL. De kie do venu la mono? Ni ekzamenu la financojn.

Mi evidente elektas nur kelkajn partojn el la buĝeto de 1994, kiuj rekte koncernas la aktivecojn en Flandrio.

Vertikale

La parto de la membrototizo, kiu venas ĉe FEL sumiĝas je 121.000 fr.
Por tiu mono, la centro liveras:

Horizontaal, afranko	40.000 fr.
materialo	25.000 fr.
Vertikale, afranko	4.000 fr.
materialo	4.000 fr.
Senpaga dissendo de informmaterialo	137.000 fr.
Manlibro por aktivuloj	3.000 fr.
Generalaj kostoj (leterpapero, kovertoj, pakmaterialo, aparatoj ktp)	109.000 fr.
Kostoj de riparoj ks.	22.000 fr.
Sekretariaj kostoj	21.000 fr.
Revizoro (devigal)	25.000 fr.
Luo de la domo	240.000 fr.
Impostoj	3.000 fr.
Asekuro	34.000 fr.
Varmigo	24.000 fr.
Elektro	64.000 fr.
Akvo	9.000 fr.
Purigo	10.000 fr.
Telefono, telefakso, elektronika poŝto	59.000 fr.

Ĉu vi kuraĝas fari la adicon? Per 121.000 fr. da kotizoj FEL pagu do 5% de la salajro de subvenciata oficisto plus 833.000 fr. da laborokostoj. Krome necesas ankoraŭ pensi pri renovigo de la meblaro, riparoj de la domo kaj de la maŝinaro ktp. Kiel solvi tiun breĉon? Tio estas konstanta zorgo por la estraro kaj la oficistoj de la centro. Se vi sekvis la vivon de FEL, vi scias, ke en 1993 FEL havis deficiton de 400.000 fr. En 1994 la jaro finiĝis ekvilibre. Sed en 1995 ni denove timas por deficiito. Kiu pagos tion?

Kaj malgraŭ tio, la FEL estraro volus helpi al la lokaj grupoj. En la centro troviĝas kompost-, pres- kaj fotokopimaŝinoj. Lokaj grupoj povas senpage uzi tiujn servojn ĝis certa buĝeto, depende de la lokaj aktivecoj! Flory Witdoeck faksis mendon de afiŝoj por La Konko en vendredo, kaj en la posta mardo ili estis pretaj kaj liveritaj ĉe la filino de Raymond Willeman. Laŭeble ni efektigos grafikajn laborojn en Antwerpen, sed ni ĉe pretas pagi fakturojn de via grupo. Kion plian vi ankoraŭ atendas?

Dum la sama konversacio, mi aŭdis la opinion, ke Antwerpen „profitas“ de la centro. Mi jam klarigis al vi, ke mankas mono por pagi ĉiujn laborojn per pagitaj oficistoj. Feliĉe en Antwerpen troviĝas aro da volontuloj, kiuj regule senpage laboras por FEL: Jules Verstraeten, Clementine De Cuyper, Leontine Janssens, Denise Parente, Henny Jacques, Cor van Ekelenburg kaj Ivo Durwael. Mi ankaŭ menciis Gerd Jacques, Paul Peeraerts, Guido Van Damme, kiuj plenumas amason da horoj ekster la deĵoro. Ili faras tion, por ke via Horizontaal, Vertikale, Monato ktp ĝustatempe alvenu.

Kara amiko, mi admiras la amason da laboro, kiujn vi kaj la aliaj aktivuloj senpage faradas. Mi evidente esperas, ke la grupoj konservos sian dinamismon. Sed sciu, ke la problemo de manko de hom- kaj laborfortoj estas ĉiea en FEL, same kiel la bona volo por fari la neebilon.

Amikajn salutojn.

Via,

Ivo Durwael,
prezidanto.

ALIĜILO

PRAGO



Konstanta adreso: 81-a UK de Esperanto
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando

81-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
20-27 julio 1996
Prago, Ĉeĥa Respubliko

Kongresa numero:

Adreso de LKK: P.K. 1069, III 21 Praha 1, Ĉeĥa Respubliko

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON, FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON - BONVOLU TAJPI AŬ SKRIBI PRESLITERE, LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.

FAMILIA NOMO VIRO/VIRINO
(por alfabeto ordigo) (forstreku unu)

PERSONA(J) NOMO(J) UEA-KODO -

ADRESO (nucilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo)

LANDO TEL. N-RO (kun prefikso)

PROFESIO / FAKO

ŜATOKUPO NASKIĜDATO

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko;

mi sendas ĉi tiun aliĝilon al mia landa peranto kaj samtempe pagas laŭ suba specifo

- al KB-konto 402-5510531-55 de Flandra Esperanto-Ligo
- al poŝtĉekkonto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo
- al ASLK-konto 001-2376527-06 de Flandra Esperanto-Ligo
- el mia FEL-konto, kie estas sufiĉa kredito (bonvolu debeti tie).

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn dorsflanke sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO SUBSKRIBO

Por uzo de la administracio / peranto:		KOTIZO (vidu dorse)
uea-membro en kategorio/jaro		BLINDULA KASO
konfirmo de peranto:		DONACO AL KONGRESO
konfirmo de CO:		FONDAĴO CANUTO
PAGO EN CO	KONFIRMO	INFANA KONGRESETO
nomoj		TRIAMONDA FONDAĴO
		VOLONTULA FONDAĴO
		ENTUTE (en belgaj frankoj)

Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto:

Se vi aliĝas kiel handicapulo, ĉu UEA jam havas atestilon? jes / mi kunsendas (forstreku unu)

Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorse):

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al Flandra Esperanto-Ligo.
La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la **15-a de junio 1996**.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON B.V. ATENTE RELEGI LA ĈI-PAĜAN KLARIGON.

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj prezoj en belgaj frankoj)	ĝis 95 12 31 1-a periodo	ĝis 96 03 31 2-a periodo	ekde 96 04 01 3-a periodo
1. ne individua membro de UEA	4 995	6 260	7 440
2. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	3 980	4 995	5 995
3. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA	2 995	3 740	4 480
4. kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA	1 980	2 495	2 995

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T) en la kongresa jaro 1996. *Ne temas pri Aliĝitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*

Komitatano: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA.

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 66 01 01 kaj 75 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo postulas akompananton, kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 75 12 31;
- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): "8. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK." Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton por la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.

**Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.
Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.**